n-ro 75

januaro 2002

# La Merkato

ISSN 0941-9306

*Ni deziras al la membroj de IKEF kaj al la ceteraj legantoj de 'La Merkato'*

*feliĉan kaj prosperan Jaron 2002,*
*kaj sukceson en viaj agadoj por kaj pere de Esperanto.*

*Ni ĝojus renkontiĝi kun vi en iuj aranĝoj de IKEF, ekzemple dum la 87a Universala Kongreso de Esperanto en Fortaleza, Brazilo.*

*La Estraro de IKEF*

## Enhavo

Instigo al komerco per Esperanto en la reto . . . . . 3
Nova adreso . . . . . 4
Anoncitaj aranĝoj . . . . . 5
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 6
Ĉinio kaj la Monda Organizaĵo pri Komerco . . . . . 7

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: Laŭokaza Novajletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al FEL.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB, IBAN: BE14 0001 5926 2983.)

**Perantoj**

*Internacie*: FEL - Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto

syama (a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)



**Instigo al komerco per Esperanto en la reto**

Per la rapida mondvasta plivastiĝo de *INTERNET* la komerco en la reto fariĝas pli kaj pli grava. Estas facile kalkulebla, ke post kelkaj jaroj pli ol la duono de la tuta komercado okazos ne fizike en magazenoj, kaj ankaŭ inter entreprenoj ne per tradicia negocado, sed kiel "e-komerco" (elektronika komerco, angle: *e-commerce*, *e-business*) en la reto.

Por ni, IKEF-anoj, nepre necesas ke ni okupiĝu pri tiu afero kaj uzu tiun instrumenton en nia negocado. Ĉe tio ni laŭeble aldonu plian "e" (Esperanto) rezultiganta "ee-komercon" (elektronika esperanto-komerco) .

Kiel apartan servon UEA-prezidanto Renato Corsetti establis por IKEF retliston <per-esperanto-komerco(a)yahoogroups.com>. Tiuj inter ni, kiuj negocas aŭ planas negoci, volas vendi aŭ aĉeti, uzu tiun retliston por trovi esperantistan partneron. La prizorganto de la retlisto estas Santiago ALVAREZ. Similan retliston establis la IK-reprezentanto de la malagasa Esperanto-Asocio sub la retlisto <internacia_komerco(a)yahoogroups.fr>. Do ankaŭ tiu retlisto estas je via dispono. (Vidu je <www.eventoj.hu> por aktuala listo de ĉiuj diskutejoj.)

Ne lastrange mi menciu la retpaĝaron de nia estrarano kaj peranto por Ĉinio, s-ro WANG Tianyi, <www.komerco.com>. Li jam plej longtempe instigas al komercado pere de la reto.

Do la veraj komercistoj inter niaj membroj havas per tio sufiĉe da oportunoj por praktiki "ee-komercon".

Franz Josef BRAUN

**Kelkaj kontribuoj el la listo <per-esperanto-komerco(a)yahoogroups.com>**

*De Emilio Cid, Brazilo*

Mi estas komercisto, SED ankoraŭ ne komercisto per Esperanto. Mi havas tri fizikajn ŝu-magazenojn en São Paulo - Brazilo, unu virtualan je www.sapato.com.br, kaj ankaŭ unu virtualan magazenon pri brazilanaj ŝtonoj je www.pedrasdobrasil.com.br. Tiun lastan mi jam komencis traduki al Esperanto.

Per tiuj virtualaj magazenoj mi vendas ne nur al Brazilo, sed ankaŭ al Usono, Latinameriko kaj Eŭropo. Ankoraŭ estas timemaj aĉetantoj, sed la afero ja kreskas. Kaj laŭ

mia sperto, angla ne estas plu la plej bona ebleco por vendi. Al Usono, Britio, Germanio kaj aliaj elgermanaj landoj jes, sed al Francio, Italio, Hispanio, Latinameriko, ne.

*De Ĉielismo WON, ĉina peranto de IKEF, <komerco(a)public.xa.sn.cn> , <informo(a)komerco.com>*

Esperanto aperis helpe de komercisto: bopatro de L.L. Zamenhof. Dum la Zamenhofa periodo Esperanto jam estis praktika por komerco. Kaj mi iam legis historion ke tiam komercan kunvenon de Esperanto ĉeestis eĉ itala ministro pri komerco kaj delegito de la ĉina registaro. Mi foje demandis min, kiam nia praktiko de Esperanto por komerco povos atingi la historian nivelon, sed ne diskutadas, ĉu ni povas uzi Esperanton por komerco aŭ ne. Mi estas komercisto. Mi ne konas la anglan lingvon. Dum la pasintaj monatoj mi eksportis al mia partnero, bulgara E-komercisto, 31 kontenerojn da ĉinaj artfajroj kaj petardoj (ĉ. 800 tunoj da eksplosiva varo).

Mia sperto:
1. Se ni ne profesie okupas la komercon, la sukceso ne havas garantion. Fakte la profesia okupo ankaŭ ofte ne havas sukceson, kaj amatora okupo certe ne havas veran sukceson.
2. Unu el la du estu finance potenca. Se ambaŭ estas senmonaj, la diskuto estos vana.
3. La komercisto devas havi komercan okupon je unu varo, sed ne peri ĉiajn varojn.

*De Michel Basso, Francio*

Profesie mi estas estro de konstru-firmao de 30 laboristoj, kaj mi baldaŭ malfermos firmaon pri komerco de diversaj varoj. Mi jam komercis pere de Esperanto profesie kun seriozaj partneroj, kaj estis profitdona. Pro tio mi investis en stoko de varoj. Mi jam aĉetis en Italio (okazis en itala lingvo kun esperantistoj), kaj en Ĉinio (ĉio okazis en esperanto, inkluzive de la fakturo kaj dogan-paperoj). Mi pagis sen garantio, kaj rekte al esperantista firmao surloke. Ĝis nun ĉio iris bone kaj en 4 mendoj de 70.000 USD totale, mi gajnis nete 10.000 USD, kion nun mi reinvestas por Esperanto kaj komerco (stoko de gantoj, diamantaj diskoj, oliv-oleo kun etikedo en Esperanto, ...)

Laŭ mi ni devus labori pli bone pere de Esperanto, sed oni bezonas monon por komenci, kaj profesie oni devas esti bona vendisto. Ĉar sen rapida vendado okazos nenio. Mi estus preta investi en iu lando por helpi esperantistojn, sed mi nur povas fari tion unufoje, do oni devas bone studi kaj ne riski.



**Nova adreso**

207. S-ro Stasys KRUZINAUSKAS, Rozių 45, LT-4270 VILKAVIŠKIS, Litovio, retadreso <stkruz(a)lrs.lt>.

**Anoncitaj aranĝoj**

**Internacia Konferenco pri Aplikado de Esperanto, 5-10 aprilo 2002, Xi'an, Ĉinio**

Organizanto: Zhiyuan Internacia Kultura Kompanio (adreso: 602 Yuntongdasha, Huanchengnanlu Xiduan #29, CN-710068 Xi'an, rete: partnero(a)pub.xaonline.com.
Ĉeftemo: Kiel apliki Esperanton en la nuntempa socio.

Dum la konferenco okazos diversaj fakaj kunvenoj por diskuti:
(1) Kiel pli bone apliki Esperanton en fakaj kampoj.
(2) Kiel fortigi internacian kunlaboron inter esperantistoj.
(3) Kiel servi al socio pere aŭ ponte de Esperanto kaj profiti de tio.

Programoj artaj kaj amuzaj; fakaj programoj de profesiaj trupoj.
Ekskursoj: Antaŭ kaj post la konferenco eblas ekskursoj laŭ postuloj de partoprenantoj.

**KAEST 2002 pri elektronikaj rimedoj: 8-10 novembro 2002, apud Prago**

KAEST 2002 (Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) havos kiel ĉeftemon "Elektronikaj rimedoj". La temoj de la du aliaj sekcioj estos "Terminologiaj problemoj de apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko" kaj "Scienco kaj tekniko ĝenerale".

Informojn oni povas peti ĉe Kava-Pech (Jarlibro de UEA 2001, p.143), retadreso: info(a)kava-pech.cz, TTT-ejo: www.kava-pech.cz).

La aktoj de KAEST 1998 ("Modernaj rimedoj de komunikado"; 193p., EUR 16,50) kaj KAEST 2000 ("Fakaj aplikoj de Esperanto"; 157p., EUR 16,50) haveblas ĉe la Libroservo de UEA.

**Xi'an-a Konferenco de Investo kaj Nogoco, aŭtuno 2002, Xi'an, Chinio**

Por pliigi ekonomian kunlaboron kaj enkonduki pli da kapitalo por progresigi la ekonomion de la antikva historia urbo Xi'an, la registaro decidas daŭre okzigi xi'an-an konferencon de investo kaj nogoco en la aŭtuno de 2002 (pri la preciza dato atendu nian informon en la reto).
La konferenco estas organizata de la urba registaro, kunlaboras ankaŭ en- kaj eksterlandaj amikecaj urboj, ĉefurboj de la provincoj okcidentaj de Ĉinio, famaj investaj institutoj kaj komercaj ĉambroj. Dum la konferenco estas ekspozicio, forumo, seminario, ekskursoj, artaj kaj amuzaj programoj, ktp.



Samtempe okazos la "Internacia Turisma Festivalo de Silka Vojo". Tiam pli ol 500 investindaj programoj serĉos kunlaboron en la konferenco, pli ol 3000 komercistoj, investistoj kaj entreprenistoj en- kaj eksterlandaj partoprenos en la konferenco. Pli da turistoj renkontiĝos en la turisma festivalo kaj vojaĝos laŭ la silka vojo.
Kiel unu el la akceptantoj, la Interflua Departemento de Shaaxi Internacia Publikrilata Asocio respondecos akcepti individuojn kaj kolektivojn el eksterlando kaj liveras al ili servojn laŭ ilia postulo. Pliajn informojn petu de ni aŭ atentu nian sciigon en la retejo www.kunlaboro.com.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĝenerale**

TAKE - LA DOMO serĉas staĝlokojn por du junaj diplomitoj (teknika abituro) el Tsaratanana (Malagasio), parolantaj la malagasan, la francan, Esperanton kaj iom da angla. Ili petas pri ebleco staĝumi en eksterlando. Studoj: domkonstruado kaj mekanika fabrikado. Vivtabeloj kaj pliaj precizigoj estas haveblaj ĉe: take.ladomo(a)wanadoo.fr

**Bulgario**

Mi serĉas tekstilkomercistojn en Eŭropa Unio. Mariajn Ivanov <mivanov(a)mail.com>, BG-5000 Veliko Tarnovo, Bulgaria (IKEF 253).

Mi estas inĝeniero kaj laboras kiel peranto (*broker*) al borso. Komercataj varoj estas tritiko, maizo, helianto, fazeolo kaj aliaj nutraĵaj varoj. Mi deziras kontaktojn kun komercantoj por estonta kunlaboro. Margarita Savova, <esperanto_bgus(a)yahoo.com>, Russe 7000 BG.

**Irano**

S-ro Masud Gudarzi, <masud8422(a)yahoo.com>, estas eksportanto de piklaĵo, diversaj sekigitaj fruktoj (ekzemple: avelo, migdalo, sekvinbero, juglanda karno, pistako, safrano), mielo, ŝtofoj, ŝuoj, drogherboj, tapiŝoj, tapiŝoj, roza akvo, floroj, vestaĵoj, ŝtonoj, bicikloj, spageto, ceramikaĵo, sapo; ankaŭ de speciala bongusta dolĉaĵo kiu nur estas trovata en Irano kaj nomiĝas ‘Nogl’ en diversaj koloroj kaj formoj. Bonvolu kontakti kun mi. Poŝtadreso: p.o.box 69135-554, BORUJERD, Irano.

**Kolombio**

Turistoj aŭ negocistoj vizitantaj Kolombion kontaktu por neforgesebla restado la "HOSTAL DEL NORTE" situatan en la koro de la norda parto de Bogoto. Grupoj atingas kontentigan rabaton. Esperantistoj atendas vin tie! Rete: <esperanto12(a)lycos.es>.

**Litovio**

Estas invitataj investantoj al litova merkato por:
1. finaranĝo de kvinĉambra hotelo (kun aldonoj) sur limregiono Litovio-Kaliningrad;
2. agrikulturo;
3. konstruo de ripozejo apud vojo Moskvo-Kaliningrad ĉe lago en Litovio;
4. rezervaj partoj de personaŭtoj;
5. organizo de turismaj ekskursoj tra Litovio.
Kontaktu: Stasys Kruzinauskas, Roziu 45, Vilkaviskis, Litovio; tel. +3709904065, rete <stkruz(a)lrs.lt>.

**Ĉinio kaj la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK, angle WTO)**

Sur la retpaĝoj de la germana revuo Der Spiegel (www.spiegel.de) fine de novembro 2001 aperis intervjuo kun s-ro Wang Xuebing, estro de Zhongguo Jianshe Yinhang (Ĉina Konstrua Banko, angle *China Construction Bank*), la kvara plej granda ŝtata banko de Ĉinio kun 420.000 dungitoj. S-ro Wang, 49jara, estas konsiderata kiel unu el la ĉefaj ekonomiaj reformistoj de la lando.

S-ro Wang opinias ke Ĉinio estas bone preparata al aliĝo al WTO. Ja estas ekde kelkaj monatoj malrapidiĝo en la internacia komerco, sed tio frapas ĉiujn landojn. Ĉar multaj ĉinaj produktoj estas malmultekostaj, la merkato restos stabila kaj la prognozita kresko de la ekonomio je 7 % jare restas realisma.

Tamen, necesas pli da bankaj reformoj. En la deka kvinjara plano la registaro difinis gvidliniojn por la kvar ŝtataj bankoj. Eblus privatigoj, sed precipe necesas moderna manaĝado. La gvidado de la bankoj estu sendependa, sen nocigaj intervenoj de superaj instancoj. La entrepreno devas havi eblon stimuli la dungitojn per alloga salajro, plibonigita trejnado kaj promocio de talentuloj.

Grava problemo estas la riskoj hereditaj el la pasinteco. La ŝtato prenis monon el la kasoj de la bankoj favore al ŝtataj entreprenoj, sen kontrolo kaj sen takso de la riskoj. Nun restas kreditoj je pli ol 200 miliardoj da usonaj dolaroj (kvarono de la tuta kreditportfolio) al bankrotantaj ŝtataj entreprenoj. *(Komence de novembro en Pekino*



*okazis internacia kunveno, dum kiu oni klopodis vendi tiajn kreditojn je reduktita valoro al eksterlandaj investantoj. - rr)*

La nombro de dungitoj estas tro alta, sed precipe la kvalito de la manaĝado ne sufiĉas. La socia asekuro en Ĉinio estas administrata en la provincoj. Sekve, la dungitoj de la bankoj estas, ekzemple donante kreditojn, precipe lojalaj al siaj lokaj administradoj kaj entreprenoj, kaj malpli al sia banko. (resumis rr)

reklamo OSIEK